

Ne forgesu Esperantujo somere!

MELA

15-a MEMzorga LAg-umado en Délegyháza,
 dato: 20-a – 28-a de aŭgusto 2006
 programo: Sun- ŝlim- kaj akvobanado, babilado, petolado,
 ripozado,
 diboĉado ktp. en sovaĝa apudlaga tendumejo. Zorgu
 mem pri



eventualaj manĝoj, trinkaĵoj, tendo, necesejpapero ktp.
 Ne estas kotizo. Naĝkostumo ne necesas. Proksimume
 15-25
 partoprenantoj plus 15 dumtagaj gastoj el 5-10 landoj.
 pliaj informoj: <http://www.krokodilo.de/mela/mela.php>

IJK

Ĉi jare jam la 62-a IJK okazas en Sarajevo, la ĉefurbo de
 Bosnio-Hercegovino, situata en la valo inter kvar olimpikaj
 montaroj. Temo de la kongreso estas ‚Multkultureco kaj
 tutmondiĝo‘. Oni certe ne trovos pli konvenan lokon en la
 meza Eŭropo por diskuti pri multkultureco, ĉar Sarajevo,
 konata kiel ‚Europa Jerusalemo‘, estas loko kie kvar
 diversaj religioj kaj kulturoj kunvivas dum jarcentoj. Vivi

flank-al-flanke kun malsamuloj,
 respekti unu la alian kaj kune
 travivi malfacilaĵojn estas kutima
 afero en Sarajevo.

Ni invitas ĉiujn partopreni la 62-an
 IJK-n en Sarajevo. Vi povas aliĝi
 ĉe www.tejo.org/ijk kaj skribi por
 pliaj informoj al: pri-ijk@tejo.org.

Ĝis la revido en Sarajevo!!!!

FESTO

FESTO 2006, Kore invitas vin!
 Ĉi-jare la Festo fariĝas pli granda
 muzika festivalo. Ni kunlaboris
 kun Eŭrokka por krei nekredoblan
 programon. Unue la reveno de
 Kore, por novuloj kiuj ne konas
 ilin: estas ege bonkvalita poproko
 kiu venas el Francio. Suzana
 el Polando kaj Elena el Rusio
 reprezentos folkon el orienta
 lando. Tiel vi do povos kompari
 kun francaj tradiciaj kantoj de
 FaMo. Pli modernstille estos repa
 kaj tekna koncertoj, aldoniĝos
 teatraĵo, ekskursoj, kaj frenezaj
 ekskluzivaj aĵoj de la ĉiama Festo.
 Detala programo kaj interreta
 aliĝilo ĉe :
<http://festo.esperanto-jeunes.org>
 Pri la kastelo <http://www.gresillon.com>.

Eo-Trovaĵo #II

estas lumo je la fino de la tunelo....

uzante subaŭtovojan tunelon
 en krakovo mi subite estis
 ĉirkaŭata de verdaj steloj kaj
 esperantlingvaj proverboj!

trovita de Luisa Rund 2005



2/2006

-kune-



Zamenhofs Erben

27. Jahrgang, ISSN 0942-0576 und 11405

Impressum

Chefredakteurin: Stefanie Hanisch, Layout u. stellvertretende Redakteurin: Katharina Tanzberger, Korrekturleser deutsch: „Sinonimo“, Korrekturleser Esperanto: Aleksandro Galkin, Versand: Carolin Hötzl, Herstellungsort: Anröchte, Druckerei: Kirchhoff Druck-Technik, Bergerstr. 21, 59609 Anröchte, Medieninhaber: Dt. Esperanto-Jugend, Einbecker Str. 36, 10317 Berlin, Auflage: 700 Stück, Verkaufspreis: 2,50€, Das Jahresabo kostet 10€, für Mitglieder der DEJ und AEJ ist der Bezugspreis im Mitgliedsbeitrag enthalten, mehr dazu unter dej-intern. Anzeigenpreise auf Anfrage.

Die /kune/ ist die Verbandszeitschrift der Deutschen Esperanto-Jugend e.V. und der Österreichischen Esperanto-Jugend und erscheint viermal jährlich. Namentlich gekennzeichnete Artikel spiegeln nicht unbedingt die Meinung des Vereins oder der Redaktion wider.

Titelbild: Foto v.Wikipedia, Collage K.Tanzberger

THEMA - ZAMENHOFS ERBEN

Intervjuo kun LC Z-Z	04-08
Libro „la familio Zamenhof“	09
Esperanto Museo Vieno	17

/kune/

editorial

Pretas – kune kreis la unuan „Bookcrossing identigilon“. Bookcrossing – tiel nomiĝas sistemo por ĉasado kaj trovado de libroj per interreto. Vidu ankaŭ www.bookcrossing.com. Oni ekentuzasmis pri tio ĉe la tuta mondo, ekzemple ankaŭ en Francio – Parizo. Tien la kune teamo vojaĝis ne pro libroj, sed por intervjui nepon de la kreinto de Esperanto.

Nian restadon en la franca ĉefurbo gastigante ebligis Franck Bourgeois – multan dankon, Franck!!!!

Kaj al vi ĉiuj bonan legadon! Salutas vin
Via kune teamo.



inhalt

2/2006-03

BERICHTE - TREFFEN

π -semajnfino	14-15
-------------------	-------

RUBRIKEN

Kreativa Atako - Raymond Schwartz	12-13
Salomea	21
Eo-trovaĵo	24
Adresen	22
dej-intern	23

SUB18

konfuz- ...	18
sub18-Treffen in Stuttgart	19

VERSCHIEDENES

Ein Buch in freier Wildbahn	16
Esperanto-Domo Berlin	20
Pariser Tagebuch	

03, 04, 07, 08, 11, 13, 15, 16, 21

Hier ist das Pariser Tagebuch des kune-teams (Luisa, Kathi und Stefa) in Paris, auf der Jagd nach einem Interview mit dem Enkel von L.Ludoviko Zamenhof, Louis Christophe Zaleski-Zamenhof. fotos v. L. Rund, K. Tanzberger
Februar 2006-
kune-Arbeits-treffen in Sü-
ßen, wir disku-
tieren mögliche
Themen für die
nächsten kune-
Ausgaben. Eine
ist „Zamenhofs
Erben“, dafür
müssen wir z.B.
Zamenhofs Enkel
finden. Die Idee
nach Paris zu
fahren ist ge-
boren.

- Fabiano, filo de Volfo Zamenhof
- Jozefo
- Marko (Mordchaj) & Klara Zilbernik
- Paulina Schwarzenberg
- Rebeka Friedmann
- Anna Flamborg

Intervjuo kun Louis C. Zaleski Zamenhof Renkontiĝo kun la Nepo kaj la Avo

/kune/ **intervjuo kun**

- Lazaro Ludoviko & Klara Zilbernik
- Sara
- Fania
- Aleksandro Pikower
- Augusta
- Henriko Hermelin
- Felikso
- Helena Rytenberg
- Henriko
- Sabina Szpinak
- Leono
- Leokadia Warszawska
- Aleksandro
- Ida
- Jakub Zimmermann

Fr. 10.03. - 0043- Frankreich. Ja! Spreche ich mit Louis-Christophe?! Seine Bedingung für das Interview: zuerst sein Buch „Zamenhof-Straße“ zu lesen.

de Stefanie Hanisch, Saluton@gmx.net, foto de Luisa Rund.

„C'est une belle ville“, poste diras la edzinó de Louis Christoph Zaleski-Zamenhof kaj vere ni troviĝas en idilia malgrandurba ĉirkaŭaĵo apud Parizo. Louis Christophe, la konstruisto de pontoj, artefaritaj insuloj kaj enmaraj konstruaĵoj loĝas en multifamilia domo kun tapetoj de 70aj jaroj ĉe la enirejo.

Li renkontas nin sur sia sojlo kaj kondukas al granda ĉambro. Nia triopo sidiĝas sur komforta sofo kiam li mem eksidas en angulo vidalvide. Nun li vere aspektas kiel malnova oraklo sur sia trono. Tiu homo, ŝajnas, scias respondon al ajna demando, sed ne estas facile ekscii tiujn respondojn.

Verŝajne jam kelkcentfoje li estis demandata pri sia fama avo kaj lia persona pozicio en la movado, ripetis la samajn frazojn kaj konigis al novaj generacioj (Esperantan) historian. Li famas — interalie — pro sia humuro kaj ankaŭ nun liaj okuloj malkaŝas rideton.

S- Viaj nepoj devas esti en nia aĝo, ĉu ili parolas Esperanton?

LC- Mia Nepo estas nur dekkvarjara, kaj en la mezlernejo lia unua lingvo, fremda lingvo, estis la japana. La dua estas la angla, kaj la tria la hispana. Li diras ke mi atendu ĝis li komencu lerni la kvaran!

Kaj mia nepino kiu vivas en Usono, studas veterinaran medicinon kaj estas okupita per siaj studoj ke ŝi ne havas pli da tempo por io alia. Eble mi trovu iun rimedon por “altrudi” E-on al ili.

S- La instigoj kial oni aktivas en Eo-movado hodiaŭ tute ŝanĝiĝis. Oni ekzemple volas uzi la pasportaservo-sistemon aŭ ŝatas pasigi siajn feriojn dum Eo kongresoj. Aliaj homoj simple estas fascinitaj de la strukturo de lingvo. Ĉu vi opinias, ke tio subfosas la originan ideon de la lingvo EO?

LC- Tute ne!!!! **La lingvo devas servi al diversaj celoj** kaj la ideo de la kreinto de la lingvo estis pli idealista. Li pensis, ke la lingvo

servos al la homaro por ke oni komprenu unu la alian kaj kiam ili komprenus ili amikiĝos. Evidente ili ne plu batalos unu kontraŭ la alia. Li sugestis ke la kaŭzo estis la nekompreno. Nun certe estas multaj aliaj rimedoj por ke homoj interkompreniĝu. Sed **per Eo homoj ne nur komprenas unu la alian sed ankaŭ amikiĝas.**

Li prenas sian seĝon kaj moviĝas en nian direkton.

S- Ni rigardis, kiam fondiĝis la junularaj asocioj. Do ekzemple TEJO aperis en 1938, la Aŭstra Eo Junularo nur en 1965, kaj la Germana eĉ en 51. Ĉu antaŭe la junularo ne gravis aŭ kiel okazis tio?

LC- Mi ne estas la ĝusta persono por esti intervjuata pri la historio de Esperanta movado. Tial vi povus intervjui iun en Rotterdamo aŭ Esperanto-muzeo en Vieno por trovi la tutan literaturon kiu povis respondi pli bone al viaj demandoj ol mi. Kiel mi ofte diras, mi ne ŝatas, ke oni konsideras Eon kiel aferon de la familio. Ĝenerale mi tenas min flanke de movado. Mia pozicio estis ĉiam iom speciala, mi veturis al kongreso kun miaj gepatroj kaj ni ĉiam estis iumaniere honoraj kongresanoj. Jam kiel juna knabo mi estis invitata por saluti kongresojn, sed mi neniam estis membro de iu junulara organizo.

S- Ĉu vi kredas, ke la ideoj apud Eo vere havas ŝancon kreski? Ekzemple Homaranismo. Ĉu ili vere estas aktualaj? Ĉu Eo ne estas movado de intelektuloj?

LC- Mi pensas, ke **Eo estas ilo de idealistoj** unuflanke, sed

estas **ankaŭ ilo de ĉiutaga vivo kaj ĉiutagaj kontaktoj.** Ankaŭ komercaj. Mi memoras ke iu diris ie iam ke li ne volas esti Eo-isto se Eo estus ilo de komercantoj. Mi ne pensas, ke tio validas nun. Eo estas lingvo kiu povas servi diversajn celojn kiel ĉiu alia lingvo.

- Adamo & Wanda Frenkiel
- Sofio
- Lidja

Louis C.Z.Z.

2/2006-05

Tamen estas grave, ke Eo **permesas interkompreniĝi sur nivelo de egaleco.** Ĉar certe se angla lingvo fariĝus vere internacia lingvo tiam la denaskaj anglalingvanoj havus daŭre pli bonan situacion ol aliaj ĉar ili povus daŭre pli facile esprimi siajn ideojn. Aliaj devus paroli anglan lingvon kiel duan lingvon, sed neniam sambone kiel la denaskaj anglalingvanoj.

Mi diru, ke estis periodoj, kiam diversaj naciaj lingvoj havis la ambicion fariĝi la lingvo internacia. Estis periodoj, kiam francoj konsideris sian lingvon monda lingvo, antaŭe estis romanoj, dum la 2a mondmilito estis germanoj, kiuj altrudis sian lingvon al la tuta Eŭropo, rusoj altrudis la rusan lingvon al la tuta Sovetunio kaj ankaŭ al la satelitaj ŝtatoj. Nun estas angla lingvo, ĉar Usono estas la plej granda industria kaj komerca potenco en la mondo, do ja estas utile paroli angle kaj la angla lingvo havas tial la plej fortan pozicion, tamen pli multe da homoj en la mondo parolas ĉine ol angle.

- Senia
- Anna
- Lazaro
- Lubomira & Emanuel Weinkiper
- Emilija & Jozef Stencel
- Rudolf & Stekka Weinkiper
- Irena & Stanislaw Rosengarten
- Aleksandro & Blanka Naftali & Halina Zajczyk
- Julian & Olga Nietupska
- Romana
- Maryla & Marian Szper
- Mieczyslaw
- Stefan & Patrice Joy Driskell
- Wanda & Mieczyslaw Dzbikowski
- Irena

Louis Christophe Zaleski
& Krystyna Tyszka
& Juliette Sekrecka

Kaj la hispana lingvo ankaŭ havas internacian pozicion, ĉar la tuta Sudameriko parolas hispane krom Brazilo.

Louis Christoph, kiu dum sia vivo konstruis naĝejon en Deauville, sportcentron en Chaumonix, maran stacidomon en Tanagero, pontojn en Bulonjo-sur-maro kaj multe pli,

ĉefo, kiu sidis vid-al-vide al mi faris gestojn tiajn ke mi pensis, ke li komprenis. Japanaj gestoj estas tute aliaj ol la niaj. Mi estis certa, ke li bone komprenis kaj plaĉis al li miaj ideoj, sed post duonhora de mia prelego la juna japano dum kvin minutoj tradukis japanlingve kion mi diris, do la ĉefo nenion komprenis kaj la juna inĝeniero volis traduki frazon post frazo kaj tion mi eĉ ne imagis, ĉar mi pensis, ke ĉiuj bone komprenas la anglan. Do mi neniam ricevis respondon kaj neniam gajnis la kontrakton. Ni ne nur ne amikiĝis sed eĉ ne interkompreniĝis.

Laboro ne devas esti nur por industria produktado, sed por krei kulturon, por scienco kaj krome oni devus organizi la mondan ekonomion tiamaniere, ke la fakto de **malplia laboro estu ŝanco por homoj**, ke ili povas ĝui la liberan tempon kaj digne uzi la vivon." Diras Louis Christophe en la libro "Zamenhof strato".

Ĝi abundas je progresemaj ideoj kaj gvidas tra 80 jaroj de eŭropa historio. Post la dua mondmilito Zaleski Zamenhof rompis la familian tradicion kaj fariĝis konstruinĝeniero. Tiam li ekprofesiis en Pollando, kaj laboris tie ĝis sia elmigro en 1959.

S- Kia estis la esperanta vivo en Pollando en la 50aj jaroj? Ĉu oni havis kontakton kun la okcidenta mondo?

LC- Mi pensas, ke en Pollando estis la sama sistemo, kiel en orienta Germanio, kaj tiam Eo estis fenestro al la mondo, estis muro inter okcidenta kaj orienta mondoj. Kaj estis fenestro per kiu oni povis kontakti eksterlande kaj tial en Pollando kaj en orienta Germanio la Eo-movadoj estis pli fortaj tiam ol nun

Tiam oni povis vojaĝi kaj kontakti facile en la tuta mondo. **Tiam Eo estis ilo bezonata, kaj nun ĝi estas unu el multnombraj iloj.**

S- Ĉu oni rajtis aboni eksterlandajn gazetojn kaj ricevi ilin, korespondi, vojaĝi okcidenten?

C- Jes, Jes. Vi ja povas rigardi la malnovajn kongreslibrojn kaj vi vidos, ke estas kongresanoj el orientaj landoj. Ili ne estis tre multaj,

Louis C.Z.Z.

2/2006-07

sed certe estis kelkaj. En tiu tempo mi mem vojaĝis, 48a jaro al Malmö, kongreso de M, Svedio, kaj poste en 57a en Marseille, 58a - kiam ankoraŭ estis komunisma reĝimo - mi estis en Mainz.

S- Ĉu la registraro libere lasis vin kaj ne timis ke vi restos en Germanio?
LC- Certe estis okazoj, ke personoj restis. Sed mi memoras, ke en Mainz estis tamen grupo el almenaŭ 20 kongresanoj el Pollando.

S- Antaŭ via elmigro vi devis labori en viandproduktado.

LC- Tio estis afero de komunisma Pollando, kiam mi demandis permeson por elmigri mi devis forlasi mian laboron en inĝenieria firmao kaj mi devis forpasi la „tempon de forgesui“.

S- Kiom longe daŭris tiu laboro?
LC- 2 jarojn, do dum 2 jaroj mi devis forgesi la sekretojn. Mi nomis ĝin tempon de forgesu, ne estas oficiala nomo.

Mi devis forlasi mian laboron ĉar oni konsideris kelkajn projektojn sekretaj. Kiel elmigrono estis

Catherine
Clementine
Hanna & Andreo Zaruski
Wanda Margaret & Antoine Lebard
Pierre-Louis-Antoine

Slawomir Bryllka
Magda A. Kaniuka & Andrzej Barbas
Alexander
Adrian

Mo. 10. 03. - Anruf in der Esperanto-Bibliothek Aalen: Dort ist man sich nicht sicher, ob es das Buch gibt. Sie haben selbst schon versucht es zu bestellen, vor 2 Jahren, nach dem Tod des Bibliothekars.

/kune/

intervjuo kun

kunlaboris en internacia nivelo kaj regas kelkajn lingvojn.

K- Ĉu Eo iam helpis al vi en la profesia vivo aŭ ĉu estis pli hobia afero?

LC- Estis por mi ĉiam tre agrable esti en Eujo, ĉar tiam mi juniĝas. Tie mi estis nepo kaj en la kutima vivo mi estas avo. Tamen en mia faka agado mi ne havis la okazon uzi Eon. Eble pro tio, ke en mia enĝinera agado mi plej ofte uzis la anglan.

Mi ekzemple ofte vojaĝis al Japanio, du aŭ trifoje jare. Mi memoras unu okazintaĵon: kiam mi estis en unu entrepreno mi proponis solvon, kiun mi elpensis por konstruo de ponto kaj tunelo tra tokia bajo. Oni organizis rondan tablon por dekdu personoj, kiuj venis aŭskulti mian proponon. Kaj mi preparis duonhoran anglalingvan prelegon.

Kaj kiam mi komencis, estis juna japano kiu sidis tuj apud mi kaj post unu frazo komencis diri ion japanlingve. Do, mi ofendiĝis, mi diris ke li haltu, ne interrompu min, do li ĉesis paroli kaj la granda

S- Cetere pri laboro: En via libro vi parolas kun Roman Dobrzyński pri **senlaboreco**. Mi citas... "la ekonomiaj kaj politikaj mekanismoj postrestis malantaŭ la atingoj de scienco kaj tekniko." Vi tie proponis, ke oni **ne serĉu laboron en la klasika vojo sed en novaj agadkampoj...**

LC- Jes, fakte oni ne plu povas labori same kiel antaŭ 100 jaroj, dum la tempo de manufakturoj. Tiam viroj, virinoj kaj eĉ infanoj devis labori po sepdek horojn semajne sen rajtoj al feriado. Nun maŝinoj transprenados ĉiam pli kaj pli la taskojn de produktado. Tio ne estas plago, sed advantaĝo, kiu permesos al la homoj dediĉi sin al pli rafinitaj okupoj ol produktado de varoj.

"...Dum en unu parto de la mondo homoj suferas la tiel nomatan senlaborecon, en la alia ekzistas gigantaj taskoj farendaj; milionoj da homoj suferas malsaton, ĉar ... mankas laborfortoj kaj rimedoj por plibonigi la aktualan staton. Jen plia kampo por tutgloba solidareco kaj frateco.

Hania
Aleksandra & Stanislaw Bryllka & Tomasz Kaniuka

Irenka

Robert George & Ruth Dlugi

Stefan
Ewa & Jean F.Cognac



inĝenierojn en Francujo, ne estis senlaboreco, kontraŭe, mi trovis laboron tre facile.

Kiel mi rakontis, kiam oni min demandis, kiom multe mi volas gajni, ĉar la salajro estis tre malsamaj en komunisma Pollando kaj Francujo, do mi diris iun sumon, kio ŝajnis al mi tre alta kaj la posedanto de la firmao diris, mi ne povas doni tiom al vi, mi devas doni almenaŭ 20 aŭ 30% pli, ĉar oni havas iujn ajn inĝenierojn, kiuj salajriĝas tiom malmulte. Kaj kelkaj monatoj poste mi salajriĝis jam duoble pli ol kiom mi demandis.

Louis Christophe Zaleski Zamenhof restis en Francujo, kie li edziĝis al Juliette. Ni fintrinkas la kafon, preparitan de ŝi por poste iri ĝardenen por foti nin. Zaleski-Zamenhof faras unu el siaj tipaj ŝercoj: antaŭ ol ni iras hejmen tra la „beaux ville“ apud Parizo.

La familio Zamenhof

Estas ĉiam bone ricevi superigardon. Krom „Familia galerio“ Banet-Fornalowa prezentas komunajn trajtojn de Zamenhofanoj, kiuj certe influis la ideon de la internacia lingvo.

Ĉiuj membroj de la familio apartenis al tre progresema kaj klerigita parto de la socio.

Jam la patro de Ludwig Z. engaĝigis sin en filologia kaj pedagogia agadkampo. Li – interalie nur dudekjaraĝa — fondis privatan judan lernejon kaj eldonis multajn librojn. La plej grava por la movado estis la „Frazologio-rusa-pola-franca-germana“, kiun Ludwig Zamenhof poste eldonis kiel „Proverbaro Esperanta“.

Kun sia edzino Liba Marko Zamenhof havis 9 gefilojn, inter ili estis ankaŭ Ludwig Zamenhof. Por prezenti la unuajn provojn de „Lingwe Uniwersala“ Ludwig elektis la familian hejmon kaj oni ne miras, ke poste lia edzino kaj la fratoj fariĝis la unuaj lernantoj de Esperanto.

„Sen troigo oni povas diri, ke sen la komprenemo, la forta apogo kaj la rekta engaĝiĝo de la familianoj Esperanto eble ne havas ŝancon enmondiĝi...“ asertas Banet-Fornalowa en sia enkoduko. Kaj vere kiam la bopatro de Ludwig Zamenhof finance helpis la eldonon de multaj Esperantaj libroj kaj poste ankoraŭ aĉetis ekzemplerojn(!), la edzino Klara Zilbernik transprenis ĉefe administrajn taskojn. Adam pretigis adresarojn, Sofio gvidis ampleksan bibliotekon kaj Lidja plene dediĉis sin al la instruado de Esperanto kaj homaranismaj ideoj.

Cetere pri homaranismo: la ideo de internacia lingvo ne nur estis lingva projekto. Multaj familianoj klopodis en sia agadkampo por klerismo kaj sociala justeco. Tial ekzemple Feliks kaj Leon kunlaboris kun asocio, kiu fondis infanĝardenojn en Varsovio laŭ la sistemo de Friedrich W.A. Föbel. Ilia frato Henrik esploris la kuracadon de la haŭto kaj ankaŭ kosmetikon. Li eĉ eldonis la gazeton

familio Z.

„Kobieta“ kaj la libron „Kion ĉiu fraŭlino antaŭ kaj ĉiu virino post la edziniĝo devus havi“. Ludwig Zamenhof mem kuracis pacientojn senpage kaj eĉ kelkfoje ofertis al ili monon por aĉeti kuracilojn.

Spertaj esperantistoj certe povas ĉerpi ankoraŭ informojn pri ne tiom eminentaj anoj de la familio. Sed ankaŭ por komencantoj la libro bone taŭgas. Oni facile komprenas la tekston kaj legas kun granda entuziasmo.

Kio rimarkeblas kaj ŝajnas iom troiga estas la omaĝema skribmaniero de la aŭtorino (”Zamenhof – la kreinto de Esperanto kaj bonfaranto de la homaro...“ ”Ĉiuj okupiĝantoj pri Zamenhof kaj pri la Esperantomovado devus studi tiujn valoregajn, profunde erudiciajn verkojn...“), kio verŝajne kutimis en antaŭaj generacioj.

La libro aĉeteblas kontraŭ 20,90 € ĉe libroservo Schwanzer, vidu ankaŭ <http://www.esperanto-buchversand.de>.



malfacile trovi alian laboron kaj fine oni dungis min en viandindustrio. Tamen kiel konstruinĝenieron.

K- En Pollando vi jam laboris kiel inĝeniero kaj vi poste povis translokiĝi al Francujo, kaj ni miris ĉu estis tre malfacila afero?

LC- Tiam ne, ĉar mi translokiĝis en 59a jaro, kiam oni multe bezonis

Di. 11.04. – Libroservo Schwanzer hat ohne Probleme das Buch „Zamenhof-Straße“ zugestellt. Stefa kann endlich beginnen es zu lesen.

Do. 13.04. – Luisa, Kathi und Stefa kommen in Paris an. Wir wohnen dank PS. bei einem sehr netten Franzosen. Der erste von 4 Tagen Paris!

Fr. 14.04. – nach langem Spaziergang durchs schöne Paris haben wir das Interview. Nein, nicht mit LCZZ, diesmal sind wir die „Stars“ im Radio. Die wöchentliche Eo-Sendung auf Radio libertaire hat unseren Besuch in Paris zum Thema der Sendung gemacht. Anruf bei LCZZ, niemand hebt ab. Noch 3 Tage in Paris.

Letero al filozofa

Kara Amando, Ĉu mi devas pritrakti iun kiel amikon, nur ĉr ŝi/li same kiel mi parolas Esperanton? Kun amikaj salutoj

Felix

filozofa

Kara Felix, Kompreneble ne. Amikeco neniam estas devo. Amikeco estas inklina sinteno al iu alia persono kun diversa intenseco, pro diversaj kialoj, en diversaj situacioj kaj ĉirkaŭaĵo.

Amikeco estis granda temo de klasika literaturo, sed ĝia signifo en nia tempo tute ŝanĝiĝis, kiel ĝenerale la senco de klasicismo. Ĝia profunda senco ĉe ni en Eŭropo devenas de greka herooa kompreno, tra la mezepoka kavaliro, ĝis romantika idealmorala preteco. Grandaj verkoj estis skribitaj pri tiu temo, en literaturo, por teatro, kie ploris la publiko tuŝita, sed ekstere en reala vivo ne plu renkonteblis tiu ideala amikeco, (kaj ankaŭ ĉe Schiller ne).

Klasike oni komprenis amikecon kiel idealan helpemon de unu al la alia, eĉ per ofero de sia propra vivo. Sed se ni pri

ekzakte pritraktas tion, eĉ tiu preteco restis en nur relative ŝrumpiĝinta senco. Alia homo devus veni precipe el senpera ĉirkaŭaĵo, plej ofte similaĝa, ligita al la sama sorto kaj la pruvo devus ofte veni eĉ kontraŭ la resto de la mondo.

La nuntempeco reliefigas per sia kritikeca de tiuj altaj klasikaj idealoj, ĉar ni devis sperti iliajn limojn en la realeco, kiuj ŝanĝis ankaŭ la sencon de amikeco. Ni povas diri, ke la eblecoj por amikeco plilarĝiĝis kaj samtempe malpliigis la situacioj por ekstremaj pruvoj en la civilizita mondo. Ne plu ofte ekas amikeco en iu ekstrema vivdanĝera situacio, kiel antaŭe en sovaĝaj pejzaĝoj, militoj, ktp., kiam en organizitaj devigaj kunestadoj ekestiĝis kamaradoj kaj amikoj.

La nuntempa amikeco estiĝas precipe libervole kaj memdecide. Per la nuna mondvasta komunikado amikecoj povas establiĝi inter diversaj homoj, el diversaj mondpartoj, de samaj profesioj, samaj hobiaj, inter diversaj sportistoj, ktp. aŭ simple pro la sama mondkoncepto. Homoj ekamikiĝas ĉar ili volas defendi la naturon, ili kredas per la sama maniero je Dio, aŭ volas helpi post iu natura katastrofo.

Esperanto en si mem ne entenas la devon amikiĝi, sed ĝi malfermas eksterordinare

grandan eblecon por amikiĝi kun la tuta mondo, kun homoj kun samaj aŭ nur similaj mondkonceptoj, precipe kun tiuj, kiuj estas por la paco, demokratio, por Homaj Rajtoj kaj ĝenerale por interkompreniĝo de la homaro.

Se ni pritraktas la amikecon el psikologia vidpunkto, devas esti menciita la diferenco inter amo, amikeco kaj kamaradeco, kaj esti emfazita, ke Esperanto neniun de tiuj tri anŝtataŭas, sed nur povas ebligi. Amikeco ne estas amo kaj estas ankaŭ io alia ol kamaradeco. Amo estas, (por eksteruloj, minimume en la tempo de la amo) kuneniĝo kaj donaco de la tuta personeco de unu al alia. En amikeco personeco restas limigita al la libera malferma kunkontakto unu al la alia, kun eblecoj al profunda preparolado de eĉ sufiĉe personaj problemoj. La kamaradeco estas ligita al iu objekto, al iu konkreta cela aĵo, kiun la kamaradoj volas kune atingi.

Por varbado pri Esperanto estas eĉ malfavora se oni substrekas, ke ĉiuj esperantistoj estas amikoj. Por tiuj, kiuj volas lerni Esperanton pro iu alia motivo (sciencia komunikado, politika kunlaboro, lingvistikaj kialoj, ktp.) tio estas eĉ altruda kaj ĝena. En historio de Esperanto estis epokoj kiam tiu sinteno estis ankoraŭ komprenebla,

sed nova esperantomovado troviĝas en tute nova situacio, kie sufiĉas konsideri la realan neceson de kulturaj kaj lingvaj problemoj kaj montri al la ebla solvo.

Ĉion bonan

Amando M

filozofa



Sa.15.04.- Ein weiterer Tag, an dem wir vor allem durch die Stadt spazieren, Eobücher lesen und nach Sceaux telefonieren.
Etwas enttäuscht über die soweit erfolgreiche Kontaktaufnahme mit LCZZ stürzen wir uns in die Jagd auf Spaceinvader.
Nur noch 2 Tage Paris.



OPTIMISMO

Ĉar pluŭvetis dum la tago
 Kaj defalis florpetal',
 Aŭ ĉar dronis mus' en lago
 Kaj ektimis najtingal':
 Tra senkora universo
 Larme vibras via verso.
 Se mi devus kun poetoj
 Pale plori sen esper'
 Pri la etaj mizeretoj
 Ĉiutagaj sur la ter':
 Nu, - mi estus krokodilo
 Ie ajn ĉe l' granda Nilo.
 Sed mi estas hominfano,
 Kvankam stranga specimen',
 Tial mi kun bona sano
 Vivas kvazaŭ en Eden':
 Kontraŭ pluvo - sub ombrelo,
 Kontraŭ zorgoj - ĉe barelo!

Raymond Schwartz

naskiĝis: en 1894
 lando: Germanio (tamen en
 franclingva familio)
 profesio: bankoficisto
 lernis Esperanton: antaŭ 1913
 ekagis literature: ĉirkaŭ 1920
 mortis: en 1973

En tiu-ĉi eldono de KreativAtako mi skize rakontas al vi pri Raymond Schwartz. Fakte, mi nur volas veki vian apetiton, se vi ankoraŭ ne konas lin, ĉar lin jam konantaj personoj, verŝajne kun rideto legos tiujn liniojn.

La verkaron de Schwartz oni povas dividi en du specojn: La amuziga verkaro – plej ofte poezia – kaj la pli serioza, proza parto. La aŭtoro montras sian kuriozan fantazion en kanzonoj, ekzemple en liaj kabaretoj Verda Kato (1920 - 1926), Bolanta kaldrono (1936 - 1939) kaj Tri koboldoj (1944 - 1956). Oni povas pasigi multajn vesperojn ridante pro liaj pikaj observoj kaj spritaj vortludoj! Schwartz posedas la arton de la verstekniko, pro tio la versoj fluas, la leganto ĝuas kaj vole-nevole amuziĝas. Kalocsay (vidu kune 2/2005) skribas pri li, ke li "havas tre sanan racion, grandan ĝukapablon pri la etaj ĝojoj de l'vivo, kompreneman ridon pri ĉiu homa malforto [kaj] sanan ironion pri ĉio gravmiena kaj hipokrita."

Li skribis mallongan romanon "Anni kaj Montmartre", en kiu li rakontas pri la tiklaj aventuroj de naiva knabino germana, kiu estas en Parizo. Tiu libro estas unu el la plej elstaraj. Kalocsay diras, ke "en ĝi mankas ĉiu sentimental siropo aŭ gravmiena moralprediko". Sciu, ke Schwartz estis sufiĉe granda malamiko de ĉiuj formoj de hipokriteco kaj singravigo. Do, se

vi serĉas bonkvalitan, originalan Esperantan verkon, kiu tamen estas leĝera, facile digestebla kaj pozitive influos vian animstaton – jen leg- aŭdonacpropono!

La ĉefverko de Schwartz aperis en la jaro 1963, sub la nomo "Kiel akvo de l'rivero".

Jen mi ŝatus prezenti al vi komencon de poemaro "La stranga butikoj", verkita en 1931. Ĝi enhavas ankaŭ la poemon "Optimismo", kiu sekvas pli sube. Estas rimarkinde, ke li kun tia pozitiva maniero skulptis sian vivon, kvankam li ne vivis dum tre 'facilaj' tempoj...

Mi levas la ĉapelon antaŭ Li,
 kore salutas,

Aneta
 Aneta.Ubik@web.de

LA STRANGA BUTIKO
SENKAPITALA ENTREPRENO

Telegramadreso: Strabu
 Parizo, dum Decembro de l' krizjaro
 1931.

CIRKULERO

Al mia tre ŝatata klientaro!

Mi havas la honoron informi vin, ke ĵus mi malfermis butikon ĉe angulo de la stratoj Optimismo kaj Bonhumoro, kontraŭ la konata statuo de la Granda Krizo.

Tie mi pacience atendas vian viziton. Tie vi havos la okazon konvinkiĝi pri la alta kvalito de freŝaj varoj kaj pri la modereco de l' prezoj. Tie vi povos admiri la plaĉajn bildojn, desegnitajn speciale por vi sur pakpapero, de mia bona amiko, la jama artisto Raymond Laval.


La firmo liveros rapide ĉiujn deziratajn artiklojn krom sentimentala butero, flatpomado, ricin- aŭ gad-oleo, kies provizo jam antaŭ longe elĉerpiĝis. Esperante viajn baldaŭajn mendojn, mi restas serveme-verseme

Raymond Schwartz, Butikisto.

So.16.04. – Ostersonntag,
 9:00 Anruf bei LCZZ, wir sprechen mit seiner Frau, die kein Esperanto kann. „Er kommt in 15 min wieder“, das haben wir zumindest verstanden...
 9:15 Niemand hebt im Hause LCZZ ab.
 Wieder spazieren wir den ganzen Tag durch die Stadt, während wir im Stundentakt bei LCZZs anrufen, erfolglos - leider.



π -semajnfino (aŭ: 3,1415...)



Neniu nun scipovas vere klarigi, kiel ekstis la ideo pri la π -semajnfino. Entute dek homoj dormis en nia (ne tiom granda!) loĝejo, kaj sabate ni estis jeĉ dekkvarope. Vendrede

estis kutima alvenado kaj ludado de logika ludo kaj Monopoly sur papero (dankon al Chuck pro la ideoj).

Sabatmatene ni iris al la "Mathematikum", tie ni spertis memkompreneble π kaj multajn eksperimentojn, ludojn, sapajn haŭtojn kaj prelegetojn. Jes ja oni povas multajn diversajn amuzojn vidi tie, kaj ne nur vidi – ekzemple oni povas provi konstrui ponton, komponi muzikon, rigardi sin mem en strangaj speguloj, ensaphaŭtigi

π -semajnfino

/kune/

sin mem... estas diversegaj interesaj aĵoj en tiu muzeo.

Post manĝado Chuck gvidis tre interesas ludojn: Ĉiu havis diverskolorajn paperetojn kaj du (el dek) indikojn, kiuj klarigis, kiom valoras kiu koloro de papereto. Nun oni devis ŝanĝi la diversvalorajn paperetojn kaj informojn, por ke oni atingu kiom eble plej multe da poentoj. Yulia venkis kaj gajnis dvd-on de la π -filmo, kiun ni rigardis vespere (kaj kiu verdire ne rekomendindas).

Sekvis du bongustegaj π -kukoj bakitaj de Carolin, unu kokosa kaj unu ĉokolada.

Ulrich Matthias prelegis pri asekura matematiko per interesaj statistikoj. Dimanĉe antaŭtagmeze Sascha proponis „geocaching“, pri kio vi povis legi en pasinta kune. Luj homoj kaŝis malgrandajn ujojn ie en la urbo kaj enretigis la ekzaktajn ejo-datojn. Oni serĉas tiujn ujojn per GPS-aparato. Sascha kunportis sian aparaton kaj ni kune ekserĉis. Post nur cent metroj ni trovis la unuan kaŝaĵon! La dua malaperintis en hedero, sed ni trovis trian, kies serĉo gvidis nin tra tuta Gießen.


Post greka manĝaĵo ni disiĝis kaj ĉiu vojaĝis hejmen al sia urbo. Dankon al ĉiuj helpantoj kaj ĉeestantoj, estis amuzega semajnfino!

Jan Christof Hienerwadel janchristof@arcormail.de kaj Carolin Hötzel carolinverena@gmail.com
fotoj de Jessica Dehms jede1@gmx.de

So.16.04. II.
Inzwischen haben wir das Gefühl fast die ganze Stadt zu Fuß durchquert zu haben... noch immer kein Erfolg beim Anrufen von LCZZ. "Maison avec repondeur" ist die einzige Antwort am Telefon von LCZZ. Stefa liest in jeder freien minute „Z strato“ weiter und endlich auch fertig!
Nur noch 1 Tag Paris! Ob wir LCZZ überhaupt noch treffen werden?

3,1415...

2/2006-15



So. 16.04. III. Als wir am Abend verzweifelt noch ein letztes Mal in Sceaux anrufen, erreichen wir endlich LCZZ persönlich. Juhuu, das Interview wird auf morgen Mittag angesetzt!

/kune/

ein buch...

Ein Buch in freier Wildbahn

Was 568-4011625 und 646-4011658 bedeuten

Die traditionelle Idee der Leihbibliothek erreicht neue Dimensionen über das Internet. In rund 100 Ländern hinterlassen Menschen Bücher in so genannten „crossing



zones“, um deren weiteres Schicksal unter www.bookcrossing.de zu verfolgen.

“A book is not only a friend, it makes friends for you. When you have possessed a book with mind and spirit, you are enriched. But when you pass it on you are enriched threefold”, fand Henry Miller 1969. Dies oder das spannende Erlebnis ein Buch zu suchen und zu finden bringt knapp 500.000 bookcrosser seit gut 5 Jahren virtuell zusammen. Obwohl erst ca. 25% aller freigelassenen Titel wieder auftauchen, lohnt sich das Abenteuer der bibliophilen Safari.

So unterschiedlich wie die Motivationen dahinter, sind auch die Arten Bücher weiterzugeben. Generell kann man sie unterscheiden in „Klassische Freilassung“ (um dem Zufall eine Chance zu geben) und „kontrollierte Weitergabe“ (z. B. „Sent by mail to any marine“, Afghanistan, oder „Giving to Peace Corps Volunteer“, Albanien).

Vorraussetzung für die Teilnahme am weltweiten Lesen und Tauschen ist ein Aufkleber oder eine handschriftliche Notiz im Inneren des Buches. Denn einmal registriert, erhält jedes Exemplar eine Nummer, die zusammen mit einem Hinweis auf Bookcrossing auf der ersten oder letzten Seite angebracht wird.

Bookcrossing ist zwar englisch dominiert, kennt sprachlich aber keine Grenzen. So finden sich unter dem Stichwort Esperanto 34 Einträge und dazu passend die Nummern 568-4011625 und 646-4011658, beide erst seit Kurzem in freier Wildbahn.

<kune@esperanto.at

fotoj de bookcrossing.com

Muzeo. Vieno. Terglobo. Esperanto.

Ĉu vi volas scii kio kunigas tiujn vortojn? Tiam vizitu en Vieno la palacon Mollard ĉe Herrengasse 9! Ĝuste tie la 01.12.2005 malfermis siajn pordojn du tutmodernerenovigitaj muzeoj: Terglob kaj Esperantomuzeo.

La ideo trovi por la Esperantomuzeo novan lokon kaj modernigi ĝin venis de ĝia direktoro, s-ro Mayer. Post dujara prepariĝo kaj planado kaj dank al la subteno de la direktorino de la Aŭstria Nacia Biblioteko, de kiu la Esperantomuzeo estas fakte parto, ĝi sukcese realiĝis.

Estis pripensita ĉio ĝis la malgrandaj detaloj. Modernaj montrofenestroj kun originalaj libroj kaj dokumentoj. Ĉe kelkaj el ili eĉ eblas aŭskulti originalan voĉon de Ludoviko Zamenhof aŭ parton de verso el „Sekretaj sonetoj“ (unu el la plej altnivelaj erotikaj verkoj)! Komputilaj ekranoj surmure invitas vin tuŝi ilin, por povi rakonti pri tio, ke ankaŭ naturaj lingvoj estas artefaritaj, ke en la mondo ekzistas miloj da planlingvoj kaj por montri kie kaj kiam okazas la sekva esperantorenkontiĝo. Vi povas ankaŭ ludante eklerni kelkajn regulojn de esperanto. Mi estas tre fiera pri tio, ke mi povis persone vidi, kiel s-ro Mayer ĝojas post tiam, kiam li sukcese kaptis la finaĵon -AS.

Ĉu vi sciis, ke ekde 1906 en Londono ekzistis „La Ĉekbanko Esperantista“? Ke unu fama usona (pli frue svisa) horloĝkompanio donas al siaj produktoj esperantonomojn, ekzemple „Movado“

(aĉetprezo 800 euro). Kaj, ke la rusa versio de „Internacia lingvo“ aperis kiel unua kaj tial ĝi estas la unua Esperantopublikajo. Ĉion-ĉi mi eksciis post vizito de esperantomuzeo.

m.v.t.e.

Ĉiutage en la muzeo okazas 3-4 gvidadoj. La nombro de vizitantoj kompare kun la malnova muzeo triobliĝis. Ekzemple, dum la urbafesto venis 400 vizitantoj, kio lasas prognozi, ke dum la venonta Longa nokto de muzeoj venos proksimume 4000 homoj. Pli longiĝis ankaŭ la tempo, dum kiu vizitanto restas en la muzeo. Por kelkaj eĉ 1 horo estas malmulte!

Prilabori ĉiujn aferojn al s-ro Mayer helpas Silke Zeitelhofer, Kathrin Delhougne kaj s-ro Cimpa. Ili ĉiam amike respondas al viaj demandoj kaj ĝojas pri via vizito.

Dejoraj horoj de Esperantomuzeo:

lun – mer, vendr - sab 10.00 - 14.00, ĵaŭ 15.00 - 19.00

Pli konkretajn informojn vi povas ricevi per telefono +43-01-534 10-730 per retpoŝto plansprachen@onb.ac.at

aŭ sur www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/

Sian impreson lasis por vi Schlapsi Julija, lisichkaus@gmx.at, foto de Julija Schlapsi



2/2006-17

Konfuzi... konfuzigi...
 konfuziĝi... Ĉu vi
 estas konfuzita- aŭ
 konfuziĝinta?

patriniĝi (Mutter werden; von patrino- Mutter)
 2. bei Verben: Beginn einer Handlung, z.B.: sidiĝi (sich hinsetzen; von sisi- sitzen)

IG

1. beim Adjektiv, Substantiv: jemanden (oder etwas) zu etwas machen/ in einen Zustand versetzen, z.B.: varmigi (erwärmen; von varma- warm),
2. bei Verben: jemanden zu etwas bewegen/ bringen/ zwingen, z.B.: ridigi (zum Lachen bringen; von ridi-lachen)

Viele Esperantisten haben Schwierigkeiten mit der Anwendung und Unterscheidung zwischen den Nachsilben -iĝ und -ig. Wann nehme ich was?

IG

1. beim Adjektiv, Substantiv: werden, eine Eigenschaft annehmen, z.B.: malsaniĝi (krank werden; von malsana- krank),

Aber es ist schon eine komplizierte Angelegenheit, mit diesem verflixten -iĝ und -ig. Es kommt ganz darauf an, welches Wort ich als Ausgangspunkt nehme. Nehme ich das Adjektiv "konfuzita" "mit der Bedeutung "verwirrt" als Ausgangspunkt für meine Wortbildung, so heißt "konfuzigi" "jemanden verwirren" und "konfuziĝi" "sich selbst verwirren" oder "verwirrt werden". Wenn ich aber als Ausgangspunkt das Verb "konfuzi" mit der Bedeutung "jemanden verwirren" nehme (weil ich zum Beispiel an das entsprechende englische Verb "to confuse someone" denke) dann hieße "konfuzigi" "jemanden dazu bringen, (jemand anderen) zu verwirren" und konfuziĝi "beginnen, (jemand anderen) zu verwirren".

Verwirrend, oder??

Welches ist nun richtig?

Wer es weiß, melde sich bitte bei kune! (kune@esperanto.de)

de Luisa Rund, luisa.eckig@web.de
 bildo el „Tesi la Testudo“
 - Eo-Lehrbuch“

Das Treffen in Stuttgart war für uns drei das erste Esperanto-Treffen. Wir schreiben an einer Facharbeit zum Thema "Esperanto - Der Versuch einer konstruierten Weltsprache und ihre gesellschaftliche Relevanz". Durch das Internet haben wir von Sub18 erfahren und uns angemeldet. Vor Stuttgart konnten wir nur ein paar Worte Esperanto, inzwischen schon ein bisschen mehr. In Stuttgart haben wir bei Helen einen Anfängerkurs gemacht und neben den Zahlen auch Wortbildungssilben und Grammatik gelernt. Neben den Esperantokursen für Anfänger und Fortgeschrittene gab es aber noch anderes Programm in Stuttgart. Am ersten Tag gab es zur Auflockerung ein paar Kennenlernspiele, die aber ganz lustig waren (und gar nicht so peinlich wie sich Kennenlernspiele anhören). Gleich am ersten Abend hat Leo seine virtuelle Plattensammlung ausgepackt und uns Esperanto-Musik vorgestellt. Am Freitag haben wir nach dem Frühstück Esperantokurs gemacht. Mittags ging es dann zum Japaner. Dort gab es Sushi und andere fernöstliche Köstlichkeiten. Dank Leos asiatischen Wurzeln konnte er uns viel über das Essen erzählen. Zum Essen kam Martin Schäffer zu Gast. Er ist beim Esperanto-Verband aktiv und und leitet die Esperanto-Bürgerstiftung. Nach dem Essen sind wir dann auf den Fernsehturm gefahren. Von dort haben wir einen Überblick über Stuttgart und die Umgebung verschafft. Da das Wetter ziemlich gut war, hatte man einen klasse Ausblick. Den Nachmittag haben wir im Schlosspark verbracht. Erwähnt werden sollte, dass die Jugendherberge in Stuttgart frisch renoviert wurde und sehr komfortabel ausgestattet ist. Den Freitag abend haben wir mit einer kurzen Esperanto-Lektion (Mazi en

Sub18-Treffen Stuttgart

Gondolando) und einen Film mit Esperanto-Untertitel ausklingen lassen. Am Samstag hieß es dann nach einer weiteren Esperanto-Lektion auch schon Abschied nehmen. Wir drei Jenaer Mädels und

sub18

elf weitere Espis sind wieder zurück nach Hause gefahren. Stuttgart für uns eine tolle Erfahrung in der Esperanto-Welt.

Ĝis baldaŭ
 ie, iam en
 Esperantujo.

Hele, Fine
 und Elli

fotoj de
 Andreas
 Diemel



Eo-domo Berlin

Komence de Septembro 2005 fajrego detruis la tegmenton de nia Esperanto-domo en la Berlina kvartalo Lichtenberg, Einbecker Straße 36. La akvo de la fajrobrigado malsekigis la

retransloigita al nia Esperanto-domo. Kunhelpis multaj el la Berlina junularo. Ek de la 30a de Marto la ĉiusemajna Ĵauda Rondo denove okazas en nia Esperanto-domo, kaj ekde la 31a ankaŭ la renkontiĝoj de la studenta grupo. (BSE)

Estas planite, dum Majo starigi en la renkontiĝosalono ankaŭ la librokolekton de Esperanto-Ligo Berlin, kiu ek de Julio 2005 kuŝas enkeste apud Berlino.

Tiam denove eblos prunti librojn el la kolekto. La pliaj restaŭroplanoj por nia Esperantodomo konsideras du alternativojn: aŭ a) konstruon de plialtigita tegmento, tiel ke la subtegmento estu utiligebla kiel plena etaĝo aŭ b) kroma aldono de unu etaĝo al la domo. Kiu el la du alternativoj estos realigita, dependas interalie de la decido de la konstruoficejo de la distrikto Lichtenberg-Hohenschönhausen. Kune raportos.

Sebastian Hartwig, sebastian.hartwig@interlingue.org

foto: la junaj berlinaj esperantistoj pakas ĉiujn bero-aferojn por transporti ilin al la nova kaj malnova bero en eo-domo, lichtenberg

murojn de la domo. Ĉiuj loĝantoj devis forlasi la domon. Ankaŭ la Esperanto-oficejo devis esti transloigita.

Intertempe du teretaĝaj ĉambroj estas restaŭritaj, tiel ke oni povas tie denove renkontiĝi kaj refunkciigi la oficejon. La du ĉambroj troviĝas unu apud la alia. En la muron inter la ĉambroj estis konstruita larĝa truo por du-ala pordo, tiel ke oni povu uzi ambaŭ ĉambrojn kune por pli grandaj aranĝoj. La oficeja ĉambro estos sub respondeco de GEJ, la renkontiĝoĉambro sub respondeco de ELB.

Sabaton, la 25an de Marto 2006 la Esperanto-oficejo estis

Jes! tie mankas via artikolo!
KUNE KUN VI!

Auch Dein Artikel kann in der nächsten /kune/ dabei sein! Wir freuen uns schon auf eure Artikel!

Via *kune-teamo!*

Mo.17.04. - Mit der RER fahren wir hinaus nach Sceaux und treffen dort auf den Enkel. Nach einem sehr netten, interessanten aber auch etwas anstrengenden, 2 Stunden langem Interview sitzen wir freudestrahlend in Sceaux in der Sonne!

Den Rest des Tages spazieren wir wie auf Wolken durch das große Paris.


Di.18.04. - Stefa reist aus Paris ab.

Mi.19.04. - Kathi reist aus Paris ab.

Do.20.04. - Luisa reist aus Paris ab.

AUS IST DIE JAGD DES KUNE-TEAMS NACH DEM ENKEL.

salomea



adressen

Bundesgeschäftsstelle (BerO)
Einbecker Str. 36, 10317 Berlin,
Tel./Fax.: (0 30) 42 85 78 99,
E-Mail: bero@esperanto.de,
weitere Infos unter: <http://www.esperanto.de/dej/bero.htm>

DEJ-Mitgliederverwaltung
Sabina Nedl, Rushaimerstr. 10,
80689 München
E-Mail: gej.ma@esperanto.de

Vorsitz

Andreas Diemel, Buderusstr. 3,
4507 Essen, Tel.: 02 01 47 87 202,
E-Mail: gej.prezidanto@esperanto.de

Unterorganisationen

Julia Noe, August-Bebel-
Straße 42/42 15234 Frank-
furt/Oder, Tel.: 0335 2802501,
kaj 0176 41001481
E-Mail: gej.kola@esperanto.de

Veranstaltungen

Martin Sawitzki, c/o Deutsche Es-
peranto-Jugend, Einbecker Str. 36,
10317 Berlin
E-Mail: gej.kkren@esperanto.de

Finanzen

Anna Posingies, Danziger Str. 68,
10435 Berlin,
E-Mail: gej.kasko@esperanto.de

Subventionen

Andreas Diemel, Buderusstr. 3,
4507 Essen,
Tel.: (02 01) 47 87 202,
E-Mail: gej.supo@esperanto.de

Öffentlichkeitsarbeit

Helen Bärnin, Herrenberger Straße

40, 72074 Tübingen
E-Mail: gej.kapri@esperanto.de

Internationale Beziehungen

Anna-Laura Wickström,
c/o Deutsche Esperanto-Jugend,
Einbecker Straße 36, 10317 Berlin,
E-Mail: gej.kir@esperanto.de

/kune/

Stefa Hanisch, Einbecker Str. 36,
10317 Berlin, Tel./Fax.: (0 30) 42 85
78 99 E-mail: kune@esperanto.de
Katharina Tanzberger, E-mail: kat.tanzberger@esperanto.at

Deutscher Esperanto-Bund (DEB)

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin
Tel.: 0180 3773762,
E-Mail: GEA@esperanto.de

Bücherdienst des DEB,

Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-
Seeger-Str.9, 55129 Mainz,
Tel./Fax: (0 61 36) 4 62 32
(abends),
E-Mail: wolfgang.schwanzer@esperanto.de

Deutsche Esperanto-Bibliothek

Torhaus, Gmünder Torplatz, 73430
Aalen, Tel. (0 73 61) 52 - 25 85 od.
52 - 25 80

junularo esperanta svislanda

Postfach 3324, CH-4002 Basel,
Schweiz,
E-Mail: jes@skol.ch

Österreichische Esperanto-Jugend - AEJ

Schelleingasse 54/24, 1040 Wien
E-Mail: aej@esperanto.at
<http://aej.esperanto.at/>

DEJ-Mitgliedsbeiträge 2006

Bitte beachtet: Alle Beiträge sind zum
Jahresbeginn bzw. zum Beitrittszeit-
punkt auf das angegebene Konto

zu überweisen. Zuschriften, die die
Mitgliedschaft betreffen (Adressän-
derungen u.ä.), bitte direkt an die
Mitgliederverwaltung (Adresse sie-
he oben).

Kategorie A (Jahrgang 1979-88):

- Schüler, Studenten, Azubis, Zivil-
oder Wehrdienstleistende, Arbeits-
lose 20€

- Jugendliche mit Einkommen 40€

Kategorie B (ab 1989): 10€

Kune-Abo

Falls du die Deutsche Esperanto-Ju-
gend regelmäßig unterstützen willst,
aber kein Mitglied werden kannst
oder willst, kommt ein Kune-Abonne-
ment in Betracht. Ein normales Abo
kostet 20€ jährlich, ein Unterstützer-
Abo 40€. (Für arme Schlucker gibt
es auch noch das ermäßigte Abo
zu 10€.) Alle Abos sind auch ohne
den Papier-Bezug der Kune möglich
(das spart uns die Versandkosten)
- das ist dann eine reine Unterstüt-
zung der GEJ. Anmeldung des Abos
am einfachsten unter <http://www.esperanto.de/dej/asocio/abonilo>.

Bankverbindung

Bank für Sozialwirtschaft Hannover
(BLZ 251 205 10), Kto.-Nr.: 8424901
(Beiträge, Spenden, Abos) oder
8424900 (für Treffen)

Internet

www.esperanto.de/dej. Hier ist die
DEJ mit ihren Internet-Seiten prä-
sent. Hier sind aktuelle Infos und
viele Hintergrundnachrichten über
unsere Arbeit und andere Esperan-
to- Aktivitäten leicht zugänglich.

Wir bieten auch eine
Esperanto-E-Mail-Adresse (z.B. in
der Form Gabi.Mustermann@esperanto.de) für nur 3€ pro Jahr an.

Auf diese Eo-Adresse eingehende
Nachrichten werden an deine
Haupt-E-Mail-Adresse automatisch
weitergeleitet.

Eine tolle Möglichkeit, unauffällig auf
Esperanto aufmerksam zu machen.
Infos bei: der interreta komisiono,
gej.irek@esperanto.de

Spenden

(genauso wie die Mitgliedsbeiträge)
an die DEJ sind steuerlich abzugs-
fähig. Die Bankverbindung findest
du oben.

dej intern

Mitgliederwerbepremien

Habt ihr schon mal gemerkt, dass
euer Geldbeutel genauso leer ist
wie unsere Mitgliederliste? Also wol-
len wir beides füllen.

Für jedes A- oder B-Mitglied und je-
den Kune-Abonnenten mit „normala“
oder „subtena kotizo“, den ihr werbt,
bekommt ihr euren kompletten Jah-
resbeitrag erstattet (allerdings nicht
mehr als einmal jährlich).

Grüner Draht (Verda Lineo)

Hast du der Akkusativ vergessen?
Was heißt „Esperanto“ eigentlich auf
Deutsch?

Ein DEJ-Service: Der Grüne Draht
(Verda Lineo) unter
Verda-Lineo@esperanto.de

Treffen

eine kleine Auswahl, und weiterfüh-
rende Links findet ihr auf:
<http://www.esperanto.de/dej/renkontighoj/>

germanespju

Aktuelle Hintergrund-Informationen
von DEJ-Aktiven findest du regel-
mäßig (auf Esperanto) im Weblog
der DEJ: <http://www.livejournal.com/community/germanespju/>